

4^{te} JARO.

OCEANO

N^{ro} 6

TRA LA MONDO.

• TUTMONDA • ILUSTRATA • REVUO • ESPERANTISTA •

DECEMBRO

1908.

AFRIKO

AMERIKO

ĜENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

SPORTOJ : Vintraj Sportoj en Montaro, de P-ro *Marcel Finot*.
Marbordaj ludoj en Usono.

INFANA PAĈO : La Tri fratoj, de *Xavier Marmier*, tradukita de *Jos. Pion*.

DIVERSAĴOJ : Balenkaptado, de *Marcel Finot*.

MODERNAJ SCIENCOJ : Aerveturado.

TRA LA MONDO : Ĉe la Baska lando, de *Roksano*.

DIVERSAĴOJ : La Regularo, de S-ro *Georges Chevalier*.

PRI ESPERANTO : Diversaĵoj, Enhavo de la 4^a Jaro (1^a Duonjaro).

Adreso : « Tra la mondo » Meudon (S. & O.) France.

Oni skribu legeble, sur respond-poŝtkarto ; aŭ oni aldonu respondkuponon al la leteroj.

Internaciaj RESPOND-KUPONOJ estas akceptataj kiel 25 cent (10 sd).

Oni rememorigu *siam* pri sia adreso.

CAROLINE
1907. OXFORD, EN.

ATENTU, Sinjorino

vi ekdikigas, kaj dikiĝi estas maljuniĝi. Prenu do ĉiutage du drageojn da **THYROIDINE BOUTY**, kaj via talio restos aŭ reiĝos svelta.

La flakono da 50 drageoj estas sendata afranke de la : **Laboratoire, 1, Rue de Châteaudun, Paris**, kontraŭ poŝtmandato de **10 fr.** Kuracado sendanĝera kaj nepre efika.

Oni zorgu precizi : **THYROIDINE BOUTY.**

NOVA ELDONO !

FRANÇOIS COPPEE

Unua Ĉapitro

de miaj memorskriboj

ESPERANTIGITA DE
AUGUSTE MONXTROSIER



PREZO : 75 CENTIMOJ

PARIS
ALPHONSE LEMERRE, ELDONISTO
27-31, PASSAGE CHOISEUL, 27-31
M DCCCXX

Ĉarma verketo de l' fama franca akademiano, kun antaŭparolo tute aproba por Esperanto.

Ĉe « Tra la Mondo ».

Kaj ĉiuj Esperantaj Librejoj.

VIVO DE JESUO

de **ERNEST RENAN**

laŭ la 78^a milo franca tradukis
EMILO GASSE

Mendebila ĉe ĉiuj librovendistoj, ĉe Emilo Gasse, 77, r. Ernest Renan, Havro, Francujo, kaj ĉe liaj korespondantoj :

British Esperantist, Germana Esperantisto, Ruslanda Esperantisto, Esperantisten, kaj Sro Karl Jost, Fröhlichstr., 40, Zürich (Svisujo).

Librairie de l'Esperanto

Al samideanoj en la tuta mondo.

GRAVA AVIZO.

NI povas havigi al niaj klientoj kaj korespondantoj ĉiujn librojn esperantajn kaj ĉiujn librojn **NE** esperantajn.

NI akceptas abonojn por ĉiuj gazetoj en la mondo.

NI aĉetas malnovajn librojn kaj gazetojn en Esperanto.

NI sendas niajn katalogojn senpage.

Librairie de l'Esperanto 15, Rue Montmartre Paris.
(Internacia esperantista librejo)

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

Ĉiuj korespondantoj, manuskriptoj, k. a. devas esti senditaj nur al nia administracio por erarojn aŭ prokrastojn.

Urgaj sciigoj : **REKLAMOJ, ANONCOJ**, k. a. devas alveni antaŭ la **10^a** de ĉiu monato por la tuj elironta Numero.

ONI ABONAS ĉe nia administracio (Vidu la 1^{an} paĝon) aŭ ĉe la esperantistaj gazetoj kaj abonejoj. Oni aldonu ĉiam la abonpagon.

POR ESPERANTO ★ POR ESPERANTISTOJ

Vera

Vino Campanja

PETU

LA

ORA MARKO.

Originala Produktejo de
FORTIN PÈRE & FILS en EPERNAY (France).

SENPAGAN TARIFON

Premio al niaj gelegantoj.

Tre rekomendinda estas la

POŝHORLOGO "L'ESPERO"

favore disvastiginta Tra la Mondo, kiun ni liveras je favoraj kondiĉoj al niaj gelegantoj :

Por **SINJOROJ** : 30 fr. = 12 Sm.
Por **SINJORINOJ** : { Ora, 90 fr. = 36 Sm.;
Arĝenta, 45 fr. = 18 Sm.




LA INTERNACIA TRINKAĴO VISKIO ESPERANTO

Registered Trade Mark Marque Déposée
N^o 270,042 N^o 13,195
Registered label N^o 272,434

LA OFICIALA VISKIO DE LA TRIA KONGRESO

Buchanan, Scott & C^o
Garthland Street
GLASGOW (Skotlando).



KASTELO EL NEĜO KONSTRUITA DE INFANOJ.

Vintraj Sportoj en montaro.

La vintraj sportoj ne estas novaĵo por niaj samideanoj. Multaj el ili, loĝantoj de montaj landoj, praktikas ilin de kelkaj jaroj. En iaj regionoj, kiel Svedujo, Norvegujo, Kanadlando, *skio*, *lugo*, *glitŝuo*, *glitveturilo*, estas, ne sportiloj, sed vojaĝiloj, necesaj pro longa daŭro kaj frosto de vintro norda. En aliaj landoj, pli mezvarmaj, Holandujo, Badujo, Elŝaco, glitveturito (aŭ *ŝlito*, nacia vorto) estas la sola rimedo por vojaĝi u ata dum vintro. La skio estas eĉ tre antikva ilo, citita en jaro 980, en poemoj kaj legendoj: ĝi posedas eĉ dion: *Ull*, kaj diinon, *Skade*.

Sed, se tiuj glitmaŝinoj estas tre uzitaj, ilia uzo por sporto estas tute nova, kaj la graveco de ilia vastigado estas certigita de ĉiuspecaj utiloj, kiujn ili alportas al ĝenerala turismo.

Jen estas la ĉefaj iloj uzataj en la montoj:

La *skio* estas glitŝuo por neĝo, konsistanta el du tabuletoj longaj kaj mallargaj ($2^m30 \times 0^m10$ ĉirkaŭe). La pezo de l' korpo de l' skiisto kuŝas do sur surfaco da 46 decimetroj kvadrataj; ĉar la pezo meza valoras 70 kgm., la premo estas po 1 kg. 5 por decimetro kvadrata; ia skiisto ne emos do enŝoviĝi. Plie la skiisto posedas ĉiam skibastonon, altan je 1^m60 kaj finitan de pinto kun ringeto.

La *negraketo* aŭ *skiraketo* estas similaj iloj grandsurfacaj por malhelpi la enŝoviĝon; ili permesas marŝi facile, eĉ sur deklivoj de neĝo malmola; ili posedas krampojn por halto.

La *lugo* estas malgranda glitveturilo je $1^m10 \times 0^m35$, sur kiu oni sidas rajde, kun piedoj antaŭe, po unu aŭ multaj personoj.

La *tobogano* estas alia speco de lugo, pli proksima al tero, sur kiu

oni kuŝas sur ventro; la piedoj direktigas malantaŭen. Tiuj du lastaj aparatoj estas iloj por malsupreniri la deklivojn; la lugo tre malpeza (3-5 kg. maksimume) permesas malgrandajn rapidecojn, dum per toboganoj (bobsleigh) oni havas ilon longan je 3 metroj, pezan je 100 kg. kiu permesas rapidecon de 50-80 km. ĉiuhore.

El tio rezultas ke skio kaj skiraketo estas veraj vojaĝiloj. Dank' al ili, oni povas ĉie trairi sur la lando neĝema; dum malsupreniro, ili permesas al vigla homo grandajn rapidecojn, longajn saltojn, rapidajn haltojn; sur ebena aŭ dum supreniro, ili forigas tiun barajon, kiu estas profundeco de tavolo de neĝo. La skiisto ne bezonas specialajn vojojn, nek ian aranĝon. Kia estu la profundeco de neĝo, li ĉien iros: ĉiu variema tero, kie neĝo estas daŭra, estos do taŭga por lia sporto.

Kontraŭe la glitveturiloj bezonas neĝon malmolan, gliteman, kaj vojon longan por pezmesi longajn kaj rapidajn vojaĝojn. La promenado malrapida kaj paca de skiisto tute ne similas la rapidegan malsupreniron de *bobsleigharo*, tute kuŝita sur sia ilo, tuŝanta la neĝon dum turnigoj, kaj ĉiam resoniganta la ĉoĵn per sia krio: « Ate tu » post kies sono ĉio devas malaperi. Oni ne povas pli bone kompari tiun sporton, ol kun jena: eliro kun aŭtomobilo de la pinto de valo, kaj malsupreniro rapide, laŭlonge de la vojo kiu malsupreniras al valo. La rapideco atingita estas sama, malfacileco por venki la turnigojn estas ne malpli granda, neceseco de haltigiloj fortegaj estas tiel grava. Kaj tiel oni nature uzas la grandan vojon montan mem, kiu, neuzebla pro neĝoj por



EMERITA SKIISTO.



DEIRO POR SKIKONKURO ĈE CHAMONIX.

ordinaraj veturiloj, iom post iom reiĝas la vivanta vojo somera. Oni premfrapas la neĝon, kaj oni forpelas iom da ĝi por fari du flankajn deklivojn; precipe la eksteraĵo de ĉiuj tunoj estas kovrita de deklivoj kiel eble plej altaj por malhelpi, ke ilo malbone turniĝanta estu forjetata kun siaj vojaĝantoj ekster la vojo. Tio estas cetere la sola timinda malfeliĉaĵo, ĉar la faloj ordinaraj en neĝon estas malmulte dangeŝaj.

Jam de kelkaj jaroj oni vastigadas tiun sporton en Svisujo, sur Alpoj kaj ankaŭ sur Pireneoj; la franca Turing-Klubo organizadis « grandan semajnon » de kurado dum la lasta jaro kaj intencas rekomenci en 1909 (23 29 januaro) kun kuradoj de skioj, veturiloj aŭtomobiloj, k. t. p. en Chamonix, t. e. ĉe la

piedoj de Blanka Monto, unu el la plej belaj vidindaĵoj de l' mondo.

Tiu nova sporto sukcesos baldaŭ grupiĝi en someraj urboj, nune sen loĝantoj, la montamantojn, la promenantojn konvertiĝintajn al la nova ludo per komunikado de ekzemplo kaj modo. Kaj jen la vivo revenos en tiujn lokojn forlasitajn, kaj kun ĝi, aktiveco bonfaranta, fervoro por laboro, ĝojo; plie la loĝantoj estos certaj iĝi gvidistoj, portistoj, kaj tiel iom pli riĉaj. Ĉu la sporto estas trivola ludo, kiam, pro p ezuro, ĝi donas boneston kaj esperon al malfeliĉuloj, kiuj suferas tiom pli, ke ili konis, dum kelkaj monatoj de somero, la delogan iluzion de la lukso?

MARCEL FINOT.



KIEL ONI ENIĜAS EN NEĜON SEN SKIOJ.

La Tri fratoj.

Estis foje tri fratoj, kiuj posedis nur unu pirujon. Ili ĝin gardis ekstremsorge; dum du el ili iris al sia laboro, la alia restis kiel gardostaranto apud la arbo multekara.

Anĝelo malsupreniris el la ĉielo por vidi kiel vivas tiuj tri kompatindaj mizeruloj, kaj por ilin helpi en ilia mizero. Li prenis la formon de maljuna almuzulo, kaj iris pripeti piron de tiu, kiu en tiu momento, plenumis sian gardantotaskon.

La junulo deŝiris unu piron, kaj ĝin remetante al la maljunulo diris:

— Ĉi tiu estas mia. Mi ne volas doni al vi tiujn, kiuj apartenas al miaj fratoj.

La anĝelo lin dankis, kaj la morgaŭan tagon revenis apud la arbon gardatan de alia el la fratoj, kaj faris la saman peton ol la antaŭtagon.

Jen, diris la junulo, unu el miaj piroj. Mi ne al vi volas doni tiujn, kiuj apartenas al miaj fratoj.

La trian tagon, la anĝelo proksimiĝis al la tria frato, kaj faris la saman peton, kaj estis bonfarademe akceptata, kiel la antaŭajn tagojn.

La morgaŭan tagon matene, monahovestite li eniris en la loĝejon de la fratoj kaj al ili diris:

— Venu kun mi, al vi mi volas bonon fari.

Li ilin kondukis sur la bordon de larĝa rivero, kaj tie li diris al la unuanaskito:

— Kion vi deziras?

— Mi deziras, respondis li, ke tiu tuta akvo ŝanĝigu en vinon kaj estu mia.

La anĝelo faris per sia episkopa bastono la krucosignon. La tuta riverpelvego ŝanĝiĝis tuj en vinon. Laboristoj fabrikis barelojn, masonistoj konstruis vilaĝon, kaj la anĝelo diris al sia juna protektato:

— Jen tio, kion vi deziras. Restu ĉi tie. Tio apartenas al vi.

Li kondukis poste la du aliajn fratojn sur herbejon, kie flirtis multaj kolomboj, kaj diris al la dua el la fratoj:

— Kion vi deziras?

— Mi deziras, ke ĉiuj tiuj kolomboj ŝanĝigu en ŝafojn kaj apartenu al mi.

La anĝelo faris per sia episkopa bastono la krucosignon kaj la ŝanĝo estis plenumita. Sur la tero altiĝis konstruaĵo, kie virinoj portis la lakton de la ŝafinoj, faris fromaĝojn, fandis sebon, kaj buĉist-ejo kie oni tranĉis kaj vendas ŝafkvaralojn. Baldaŭ bela vilaĝo estis konstruita en tiu riĉa herbejo.

— Jen, diris la anĝelo al la junulo tio, kion vi deziras.

Poste li denove ekmarŝadis kun la plej juna frato, kaj vojirante, li diris al li:

— Kaj vi, kion vi deziras?

— Mi amus havi veran pian edzinon. — Ha! respondis la anĝelo, tio ne facile troviĝas. Mi en la mondo konas nur tri piajn virinojn, el kiuj du estas edziniĝintaj; la tria, ankoraŭ libera, estas filino de reĝo, kaj du reĝoj volas kun ŝi edziĝi.

La juna vojaĝanto, akompanata de l' anĝelo, iris peti kiel edzinon la pian junulinon.

La reĝo diris al siaj korteguloj:

— Kia stranga afero! Du reĝoj deziregas edziĝi kun mia filino, kaj jen du fremduloj, kun ŝajno de almuzuloj, kiuj havas la saman pretendon.

— Faru provon, diris la anĝelo. Ordonu la principinon, ke ŝi plantu en sian ĝardenon tri branĉojn de vinberujo. Al ĉiu el tiuj branĉoj ŝi donu la nomon de unu el siaj aspirantoj, kaj tiu, kies branĉeton oni vidos la morgaŭan tagon, kovritan de vinberoj, estu ŝia edzo.

Tiu propono estis akceptata. La morgaŭan tagon, du el la branĉetoj estis tiaj, kiajn oni ilin vidis la antaŭvesperon, dum tiu al kiu la principino estis doninta la nomon de la juna vojaĝanto, estis ŝargata de belegaj vinberoj.

La reĝo, kiu ne povis elpreni sian promeson, edzinigis sian filinon je la malriĉa nekonato. La anĝelo kondukis la junan paron en modestan loĝejon sur la bordo de l' arbaro kaj malaperis.

La postan jaron, li volis scii tion, kio iĝis liaj protektatoj.

Almuzulovestite, li alproksimiĝis la unuanaskitan el la fratoj, kiu posedis la miraklan riveron kaj de li petis unu glason da vino.

— Nu do! respondis malĝentile la riĉa bienulo, se mi devus doni glason da vino al tiuj, kiuj de mi ĝin pripetas mi nenion plu havus por mi.

La anĝelo faris la krucosignon. Tuj akvo fluis kiel antaŭe en la rivero, kaj li diris al la avara vinberujisto:

— La riĉeco ne estis boniga por vi. Reiru ĉe vin kaj zorgu vian pirujon.

La anĝelo iris al la dua frato kaj pripetis pecon da fromaĝo.

— Ne, ne, respondis malĝentile tiu alia riĉa posedanto. Se mi devus doni pecon da fromaĝo al ĉiu kiu ĝin petas, baldaŭ mi nenion plu havus por mi.

— Iru, diris la anĝelo, malaperigante per signo la ŝafojn, la riĉeco ne estis boniga por vi, reiru hejmen kaj zorgu vian pirujon.

Li tiam iris en la humilan loĝejon de la novgedzoj, kaj petis ruĝejon dum la nokto. Ambaŭ lin kore akceptis kaj al li diris:

— Senkulpiĝu, ke ni kun vi ne agas kiel ni volus. Ni estas malriĉaj.

— Ne maltrankviliĝu, respondis la anĝelo. Je tio, kion vi bonvulos doni al mi, mi estos tre kontenta.


Kion faru? La malriĉaj geedzoj havis nek faru: non, nek greneron, ili devis knedi la ŝelon de l' arboj. El tiu ŝelo, la juna virino preparis unu paanon, kaj ĝin metis en tervazon por ĝin kuiri, poste ĉarme ekparris kun la fremdulo.

Baldaŭ poste, ŝi formetis la vazkovrilon kaj anstataŭ la maldelikata ŝelpasto, ŝi trovis belegan paanon el pura tr tiko.

— Dio estu laŭdata! ŝi diris kun sia edzo. Nia gasto estos pli bone akceptata ol ni esperis.

Ŝi metis tiun belan paanon sur la tablon, poste ŝi proksimiĝis sian akvokruĉon, kaj, tuj, tiu akvo ŝanĝiĝis en vinon. La anĝelo faris la krucosignon super la kajuto. Sur ĝia loko, altiĝis granda kaj ridanta loĝejo, tute meblita.


La anĝelo benis la junajn geedzojn, kaj ili vivadis feliĉaj.



LEONOJ EL SABLO.

Marbordaj Ludoj.

Tiun ĉi someron regis nova modo sur kelkaj amerikaj marbordoj : la skulptado el sablo. Ni montras sur tiu ĉi paĝo du el la plej kuriozaj skulptaĵoj faritaj, kiuj montras ke la aŭtoroj estis veraj artistoj.



S^{ro} ROOSEVELT KAJ LIA FILINO EN AŬTOMOBILO.



ŜIPO POSTTIRANTA MORTIGITAJN BALENOJN.

Balenkaptado.

Pro la senĉesa perfektigado de la iloj, kaj la grandega fervoro de la balenĉasistoj, la raso baldaŭ malaperos malfeliĉe. Tial ŝajnas al mi interese doni tie ĉi, antaŭ tiu malapero, kelkajn sciigojn pri tiuj grandegaj bestoj.

La baleno havas grandamplekson kaj larĝan kapon, glatan ventron, kaj ne havas naĝilon dorsan; la korpo, kiu povas atingi longecon da pli ol 25 metroj kaj pezi 150.000 aŭ 200.000 kg., estas dika, kaj tiu dikeco malpligrandiĝas subite apud la vosto. Dekstre kaj maldekstre de sia makselo, ĝi havas ne dentojn, sed iajn lamenojn kornecajn (bartojn), lokitajn preme unu apud alia, po 8-900; tiuj lamenoj estas longaj je 3 metroj, dikaj je 2 centimetroj; (la antaŭa parto de la buŝo estas senigita je ili), ili estas uzataj por fortigilaroj de korsetoj kaj vergetoj de pafiloj. Veraj dentoj ekzistas kiam la besto estas ankoraŭ juna, sed malaperas iom post iom kiam ĝi maturaĝigas. La mandibulo estas arkforma, sendenta kaj senlamena, kaj uzata de la loĝantoj de nordaj regionoj, fiŝistoj, kiel ĉirkaŭiloj aŭ pordoj. La lango estas dika, grandega, grasa.

La baleno havas ordinaro unu idon, malofte du. Kiam ĝi naskiĝas, ĝia longeco atingas 6 metrojn; ĝi restas apud sia patrino, kiu ĝin mamnutras kaj

protektas ĝis kiam ĝi povos senpere manĝi.

La baleno nutras sin per malgrandaj bestoj, ĉar malgraŭ sia amplekso, ĝi havas malgrandan ezofagon: apenaŭ haringo povas tra ĝi trairi. Ĝia nutrado konsistas el moluskoj, kankroj, fiŝetoj. La haŭto estas maldika, kaj kovras tavolon de graso dika je 20 ĝis 50 cm. Fine, ĝi sendube vivas tre longe, ĉar ĝia amplekso kreskas tre malrapide.

Ofte ili vivas are; malgraŭ sia dikeco, ili estas tre viglaj kaj tre fortikaj. La vidado estas malgranda, inteligenteco nula, sed ili vidas tre bone sub akvo, kaj takto estas tre sentema. Ili spiras ĉiudumminute, sed ili tamen povas resti unu kvaronon da horo sub akvo, kaj eĉ unu horon se ili estas vunditaj.

La unuaj balenĉasistoj estis, en XIV^a centjaro, Baskoj, kiuj persekutis ilin unue proksime al bordoj; poste ili kuraĝis riskiĝi norden, kaj iris ĝis Labradoro kaj enfluejo de Sankt-Lorenzo; sed, en 1633,



KANONO HARPUNĴETANTA UZATA POR LA BALENKAPTO.

hispana potenco malhelpis tiujn kaptadojn.


La Baskoj lernigis al Holandoj, en XVI jarcento, kaj en Amsterdamo kreigis baldaŭ societo por ekspluatado de fiŝĉasejoj. De 1676 ĝis 1722, oni konstruis pli ol 5000 ŝipojn kaj oni kaptis 33000 balenojn; tiel komenciĝis la detruado de tiuj bestoj.

La fiŝkaptado estas permesata de junio ĝis septembro, kaj okazas laŭ du manieroj: oni atendas la beston sur la bordo, aŭ oni ĉasas ĝin sur maro. Kiam ŝipoj alvenis en region-

oj, kie vivas balenoj, ili haltas sur ankroj, kaj oni eksploras la horizonton. Tuj kiam oni ekvidas unu, unu aŭ du barketoj direktas sin rapide kaj senbrue apud la baleno. Harpuno, kunligita kun longa ŝnuro, survolvita sur la antaŭa parto de l' ŝipeto, estas jetata al la besto, for kiu oni rapide foriras, ĉar ĝi tuj subakviĝas kaj malvolvas la ŝnureton tiel rapide, ke oni devas ĝin akvigi por ke ĝi ne ekflamiĝu, pro varmiĝo. Poste la besto malrapidiĝas, aŭ ĝi fortiras la ŝipeton dum kelkaj horoj; ofte eĉ ĝi baraktas tiom, ke la nefirma barketo subakviĝas. Nune oni forlasis tiujn danĝerajn rimedojn, kaj oni laboras pli rapide, jetante la harpunojn per pafilo, kanoneto lokita sur la baleŝipo. La harpunoj estas ofte provizitaj per malgranda obuso, kiu krevas enirante en korpon de la baleno kaj malfermas, kiel ombrelon, kelkajn vergetojn pintajn longajn je 25 cm., kiuj malhelpas, ke la harpuno eliru el la korpo. Kiam la baleno estas mortinta, oni ligas ĝin kaj altiras ĝin apud la ŝipo, oni detranĉas la kapon, kiun oni dispecigas kaj fandas en kaldronego; oni malvarmigas ĝin kaj oni ĝin metas en barelojn.

La popoloj noidaj manĝas karnon kaj trinkas oleon tiel plezure, kiel drinkemulo trinkas glason da vino; la skeleton ili uzas por konstrui kajutojn. Sed la civilizitaj fiŝistoj kolektas lamenojn kaj grason. Baleno longa je 20 metroj, peza je 80.000 kg., produktas 33.000 kg. da graso, 27.000 kg. da oleo (lango sola de iaj grandaj balenoj donis 6-8000 kg. da oleo); 1700 k. da lamenoj. Oleo kostas 40-50 sm. po 1000 kg., la lamenoj 18-1900 sm. po 1000 kg. Juna baleno je 6 metroj, kaptita apud Tromsø (Norvegio) kostas 2500 sm. Oni uzas oleon por lumigo, por fabrikado de sapoj nigraj, de godronoj, por mordeto de ledoj, k, t. p.

La makrocefalo estas grandega mambesto, kies longeco atingas 20 metrojn por viro, por virino apenaŭ superas 10 metrojn. La kapo, vertikale sekciita, atingas trionon de longeco de l' tuta korpo, ĝi estas ŝvelinta sur la antaŭa parto pro amasigo de graso nomita *spermaceto* aŭ blanko de baleno. La kesto krania de tiu besto similas ian oston pelvan kaj memorigas antikvan ĉaron. Tiu monstro estas fortege armita: ĝi posedas efektive 40-50 dentojn konusajn, tute samajn, dikajn kiel brako, kaj enradikigitajn, ne en apartaj dent-



BALENO SURTERIĜINTA ĈE LA SPITZBERGA MARBORDO.

ingoj, sed en laŭlonga fendo, kaj ili estas ligitaj per fibraj septumoj al la mandibulo, longa je 4 metroj kaj multe pli mallonga ol kranio. Kiam la makrocefalo fermas sian buŝegon, tiuj dentoj eniras en kavaĵojn de makzelo.

La okulo estas lokita rekte sur la ligo de la lipoj; kvankam malgranda, ĝi estas utilega ilo por la besto, kies aŭdilo estas malpli bona ol vidilo. Ĝia dika haŭto estas tre sentema, glata kaj nigra, kelkfoje makulita per punktoj blankaj. Ĝiaj membroj konsistas el naĝiloj brustaj malmulte ampleksaj, el naĝilo dorsa kiu malkliniĝas kiel konusa ĝibo apud du tri-


onoj de longeco de la korpo, kaj el vosto kiu povas atingi ĉirkaŭe 5 metrojn. La granda maso de la korpo maldikiĝas de la naĝiloj ĝis komenco de vosto, kie ĝi iĝas tre maldika.

La makrocefaloj vivas are; tiu areo konsistas kelkfoje el 300 bestoj; ili naĝas kun rapideco de 20-25 km. ĉiuhore. Tamen, dum oni renkontas balenojn sur ĉiuj maroj, oni tre malofte renkontas makrocefalojn en polusaj maroj trans 60° de latitudo S kaj N.

Ili nutras sin per sepioj, moluskoj cefalopodaj sekreciantaj nigran likvaĵon, kiu amasiĝas en la intestoj de makrocefalo kaj iĝas konkretaĵo, kiun la besto forpelas kelkfoje. Oni uzas tiun konkretaĵon en parfumarto, kie oni nomas ĝin griza ambro.

Oni ĉasadas la makrocefalon de la XVII centjaro, kaj oni faras kiel por baleno, sed tiu ĉasado estas multe pli danĝera, ĉar, kiam oni atakas ĝin, ĝi kontraŭbatalas per siaj dentoj kaj sia vosto: tiu ĉi frapas tiel forte, ke ĝi povas renversi kaj subakvigi la ŝipetojn, ĵetante tra la aero ĝis 3 metroj alte la detruitajn. Ĝi frapas ofte la ŝipojn mem per sia kapo. En 1851, sur bordo de Peruo, la trimasta ŝipo *Aun-Alexander* estis detruita per kapfrapo de makrocefalo. Feliĉe la maristoj estis savitaj.

MARCEL FINOT.



BALENO ALKONDUKITA SUR LA MARBORDO POR DISPECIGO.




DISPECIGO DE MAKROCEFALO EN LA GOLFO DE AJACCIO.

La aerveturado en 1908.


AEROPLANOJ.

La eksperimentoj de Sro Wilbur Wright apud Le Mans precipe ekcitis la intereson dum la ĵus pasinta jaro. Dum kelkaj monatoj, Le Mans aŭ pli ĝuste *Auvours* estis vera pilgrimejo por la sportamantoj; kaj, vere, ilia espero ne estis trompata. Wright sukcesis flugi dum pli ol unu horo.


Sed la granda triumfanto estis Sro Farman, kiu, la unua kaj la sola, faris veran traieran vojaĝon, longan je 17 kil., irante de Châlons ĝis Reims, super kampoj, riveretoj kaj arbaroj.



Sro FARMAN DUM SIA FLUGADO DE CHÂLONS ĜIS REIMS




LA AEROPLANO DE Sro DELAGRANGE.




LA « FLUGAPARATO » DE WRIGHT TRA LA SPACO.

Lasta sciigo: La 18^{an} de Decembro, Wright sukcesis flugon de pli ol cent kilometroj laŭ fermita ĉirkaŭo je alteco de cent metroj. Se alia konkuranto ne superas tiun rikordon, li gajnos la pokalon Michelin por 1908. Sed oni atendas ĉiam rektinian vojaĝon de la fama flughomo.



WILBUR WRIGHT INSTRUANTA PRI LA KONDUKO DE SIA APARATO.

Wilbur Wright.



LA PENTEKOSTA PROCESIO AL RONCEVAUX.

En Baska Lando.

La Baska popolo, laŭ la diro de etnologiaj kleruloj, ŝajnas fremda kolonio transportita inter ni: ĝi parolas lingvaĵon, al kiu la sciencistoj ne povas atribui filologian parencecon, kaj ĝia origino estas tiel mistera, ke neniu alia nacio povas sin nomi sia frato.

La Baskoj konsistas nuntempe el pli ol 900,000 animuloj, el kiuj ĉirkaŭ 750,000 loĝas en Hispanujo; la cetero en Francujo okupas pli ol la trionon de la departemento Basses Pyrénées. Ĉar ili ĉiam abomenis ĉian fusion (1), kiu riskus malpligrandigi ilian personecon, neniam ili sin intermiksas kun aliaj popoloj. Ili konservis iom sovaĝan sendependecon, eĉ kontraŭ siaj plej proksimaj najbaroj.

Preskaŭ ĉiam kapvestita de blua beredo klinita al orelo, vestita de jaketo kaj de pantaloneto, kun la talio ĉirkauita de ruĝa zonumo, piedvestita de sandaloj (2) alligitaj al la piedoj per rimenoj, preskaŭ ĉiam portanta ĉe l'pugno la *makila*, bastonon el mespilarbo plumbitan ĉe la malsupraĵo, la Baskoj estas plugistoj, arbodekakistoj, aŭ naŝtistoj sur la altaj montaroj en la ĉirkaŭaĵo de monto Orhi kaj de pintomonto Anie. Sed ĉiuj tiuj laboroj malbone nutras ilin, kaj la landlimo kun sia fiktiva barilo estas apude, kaj kontraŭmetas onerozajn (3) tarifojn al la negocado de iaj komercaĵoj. Ekzistas ja armeo da doganistoj komisiitaj por obeigi la leĝon; sed por tiuj krudaj homoj, la leĝo estas nur la sankcio de l' rajto de l' plej forta, hodiaŭ tiu ĉi, morgaŭ alia. Kaj de post kiam ili loĝas ĉe l' montoj, Baskoj vidis tiel multe da superregantoj, ke ili kutimas respekti nenium. Eble ili timas la pekon, la larcenon (4); sed popola proverba saĝeco respondas « ŝteli ŝteliston meritas cent jarojn da pardo » En tiu cirkonstanco, la Ŝtato estas la ŝtelisto. Eĉ la plej malicaj certigas, ke episkopo konsultita pri tiu demando diris: la peko de kontrabando ne ekzistas; la religio malaprobas nur la subaĉetadon de l' landlimgardistoj. Kaj kial subaĉeti tiun ĉi lastan?

Kuraĝaj ĝis la trobravegeco, la Baskoj neniom timas. Dum la tre mallumaj vintraj noktoj, veturante sur longaj kaj plataj


barkoj ili en la plej granda silento trairas riveregon Bidasoa, kaj ĵetas sur la hispanan bordon kestojn plenajn je produktoj imposteblaj.

Malgraŭ tio ili estas bonaj kristanoj; ĉiuj, virinoj kaj viroj, akurate ĉeestas la Diservojn. Tamen stranga estas ilia religia moralo. Efektive, dum la XII^a jarcento pilgrimanto jam konstata, ke la Baskoj neniam forgesas iri en preĝejon, sed tio ne malhelpas, ke ili ŝtelu ĉiujn vojaĝantojn, pilgrimantojn aŭ ne, de Saint-Jacques (Sankta-Jako) de Compostelle. Cetere ili restis fidelaj al la procesioj, kies tradiciojn kvazaŭ testamentis al ili iliaj prapatroj. La pilgrimejoj estas multnombraj: Jaca, Saint-Antoine, Saint-Jacques de Compostelle, k. a. Sed tiu, kiu restis plej ŝatata, estas la monaĥejo de Roncevaux. Ĉiujare, en la merkredo antaŭ la Pentekosta festo, el la tuta Basklando pilgrimantoj iras al Roncevaux. La procesio formiĝas, je la oka matene, en Burguetto, je du kilometroj de la monaĥejo. La pilgrimantoj, kun nudaj piedoj kaj kun la sandaloj pendantaj ĉe la zonumo, estas vestitaj de kagulo (5), kiu ilin kovras de l' kapo ĝis la piedoj, kaj portas pezan krucon faritan per arbotrunko. Ili ĉeestas meson kantatan, ĉiam portante sian krucon; poste, post la vespera Diservo, la procesio ree formiĝas por reiri Burguetto. Nur tiun tagon, oni malkovras la stacion de l'mirakla Virgulino de Roncevaux.

**

La Baskoj estas dum la senokupaj momentoj gajaj kiel infanoj; tial dum la ludoj en liberaero, ĉe kiuj forto kaj lerteco estas rekompencaĵaj, ili elmontras ĝojon ekzuberantan (6) ofte bruan. Ilia fervoro por la ludo de la peloto estas konata, sed la danco estas tio, kion plej ŝatis kaj ĉiam plej ŝatas la Baskoj. Voltaire nomis ilin « popoloeto dancante ĉe l' supro de Pireneoj » kaj Boileau, vojaĝante en ilia lando, konstatis ke « en tiu lando infano scias danci, antaŭ ol scii voki sian

(1) fr. ang. hisp.; fusion; it.: fusione. — (2) it.: sandalo - ang.: sandal. - fr.: sandale. - hisp.: sandalia. — (3) lat.: onerosus - hisp. k. it.: oneroso. - fr.: onéreux. - ang.: onerous. — (4) ang.: larceny. - fr.: larcin. - hisp. k. it.: latrocinio. - lat.: latrocinium. — (5) fr.: cagoule. - hisp.: cogulla. — (6) fr.: exubérant. - ang.: exuberant. - hisp.: exuberante. - it.: esuberante. - lat.: exuberans.



EDZIĜAJ DONACOJ.

patron au sian nutristinon. » Ili estas ja eksterordinare facilmovaj, kaj ilia tuta korpo senĉese moviĝas. La polkoj kaj aliaj dancoj estis antaŭ nelonge enkondukataj en iliajn dancajn programojn, sed ne malaperigante la tradiciajn dancojn tiel intime konformigitajn kun iliaj patriarkaj moroj, kaj kiujn akompanas tute specialaj ludiloj: la fluto kun tri truoj el malpeza ligno; la tambureno (1) sur kiun frapas la muzikisto per sia skulptita frapobastoneto, la gaita aŭ kupra flagolo (2) kun akraj sonoj, la *manjuelo*, speco de kurbita trumpeto el korno, kies plilongigitaj sonoj, vespere, havas en la paŝtejoj tiel potencaj melankolion. En franca Basklando estas kutime unu sola muzikisto ludanta samtempe per fluto kaj tambureno. La plej populara danco estas la *fandango*, kies ĉarmo estas mirinda alloga.

Ĉe tiu simpla kaj kruda popolo la alligiteco al la tradicioj estas la plej kara, la plej sankta el la religioj.

La alligiteco al la familia hejmo estas unu el la plej potencaj sentoj de la raso. Tuj de la viriĝeco, la unuenaskito identiĝas kun sia patro, laborante por plibonigi sian bienon; la pli poste naskitaj penas konstitui (3) bienon aliloke, kaj siavice kreas novan familion.

Tiel fortika estas la familia ligilo, ke jarcentoj da ekzistado ne povis ŝanceli ilin; tial, la ceremonioj de l' edziĝo kaj de la morto konservis tre impresman gravan karakteron. Ĉe Le Labourd la fianĉigo estas longe kaj lukse festata; solene la edziĝaj donacoj estas direktataj al la edziĝa domo: grasaj

ŝafoj kun orumitaj kornoj kaj pentrita lano, vinoj el la lando, likvoroj kun brilaj etiketoj, kortbirdoj, kukakoj, kaj precipe la piramida kuko, kies specialecon havas la Baskinoj de vilaĝo Méharin. Oni metas la donacojn en rubandornamitajn korbojn, kiujn junaj virinoj portas sur sia kapo; ili paŝas prikantante la virtojn de l' geedzoj kaj la ĉarmojn de l' geedziĝo, dum la juna *mulhil*, kiu antaŭe kondukas ŝafon kun dika sonorileto, tempo al tempo pafas per pistolo. Post la sekvantaro, venas la mebloj de la edzino sur la antaŭaĵo de l' ĉaro, en kvazaŭ-sankta teniĝo, la kudristino portas la spegulon; super la mebloj, tre videblaj, ŝpinaĵo linŝargita kaj ĝiaj ŝpinoj, bobenumilo, balailo, malpeza rastilo kaj sarkilo simbologas la okupojn de la virina mastrumado.

La funebro havas ankaŭ siajn ritojn pli gravajn kaj pli kortuŝajn. En Basklando, la enterigiĝo estas ĉiam impona: parencoj, amikoj kaj najbaroj ĉeestas ĝin. La najbaro, kies domo estas la plej proksima, oriente, portas la krucon de l' mortintoj, fosas la foson kaj prezidas la funebromanĝon. La viroj estas vestitaj per la *capac*, kaj la virinoj sekvas ilin kovritaj per sia *manieleta*, speco de mantelo kun kapuĉo ornamita per punktoj. Reveninte de la *campo santo*, oni diras preĝon antaŭ la funebra ĉambro, kaj ĉiuj parencoj kaj amikoj kunvenas por malĝoja manĝo ĉe kiu estas nek rostaĵo nek kantoj.

ROKSANO,
H. M. de E. V. K.



(1) fr. : tambourin. — ang. : tambourine. — hisp. : tamboril. — it. : tamburello. — (2) fr. k. ang. : flageolet. — hisp. : flageolé. — (3) fr. : constituer — lat. : constituere — ang. : to constitute — hisp. : constituir — it. : costituire.



DIVERSAĴOJ



KUŜĈAMBRO EN LA MALNOVA HOTEL-DIEU (2).

La Regularo. (1)

Tiu rakonto, mi esperas, eniros en la kadron montritan. Mi provis priskribi angulon de la granda Parizo, hospitalon. La jena okazo estas vidita, mi rapidas aldoni, ke ĝi estas malofta.

Estis, tiun dimanĉon, granda movado en la strato de Sèvres. Sub la bela suno printempa, Parizo havis mienon festan, la veturigistoj preterpasis rapidaj je la troto de l' ĉevaloj kaj ĝoje krakigante la vipojn. Laboristoj eliris post la tagmanĝo el la restoracioj, metinte sur la orelon la cigaredon, kiun ili tuj fumos. Paroj da geoficistoj gaje promenadis: la viro, fieraj je sia edzino dimanĉe ornamita, admiris ŝin, puŝante veturileteton, en kiu sidas saĝa infano.

Ĉie la movado, ĉie la vivo!

En mezo de l' homamaso promenanta maljuna virino marŝas per malrapida paŝado, ŝi estas malĝoja, ŝi tuj vizitos sian filon, sian Paŭlon, kiu mortigis pro ftizo en la hospitalo. Li estis tiel bela, tiu filo, tiel fortika, antaŭ unu jaro, sed foje li estis atakita de malbona malvarmumo, kaj nun kondamnite de la kuracistoj li kuŝas sur lito hospitala.

La maljunulino haltis antaŭ granda monumento kun malvarmaj kaj dubnigraj muroj; supre de la pordego armigita de krado oni legas tiujn vortojn skribitajn per oraj literoj: Hospitalo Necker. Flanke estas pli malgranda pordo, kaj antaŭ tiu pordo sur la trotuaro malfeiĉuloj vendas frandaĵojn por la malsanuloj, ilia aro ĉirkaŭas la alvenantojn, proponante

la komercaĵojn kun grandaj vokoj: la oranĝoj! la oranĝoj! sinjorino, aĉetu miajn konvalojn, kiuj bonodoras!

La maljunulino ŝanceliĝis, ŝi estis malriĉa, ŝi volis aĉeti ion por sia malsanulo, sed necese estis elekti tion, kio faros al li pli grandan plezuron. — « Sinjorino, aĉetu miajn konvalojn, tio estas la printempo! » — Tiam la maljunulino decidiĝis kaj prenis la bukedon, pensante, ke ŝia malfeiĉa infano tiel multe amis la promenadojn sur la kamparo, iam, antaŭ sia malsano.

La maljuna virino puŝis la pordon, sed la pordo estis tiel peza, ke ŝi estis devigata streĉiĝi por eniri, kaj ŝi miris, ke la malfeiĉaj malsanuloj havas la fortecon movi ĝin. Ŝi penetris en koridoron, tra la vitraĵoj oni vidis oficejon, en kiu staris pordisto vestita per uniformo malhela kun oraj butonoj; ŝi frapis ĉe la vitraĵo, kiu malfermiĝis: « La ĉambrego Trouseau? » ŝi demandis. — « En la dua korto, la ŝtuparon maldektran, sur la dua etaĝo. »


Ŝi eniris en malgrandan korton, en kiun alvenisodoroj kuirejaj, tiuj strangaj odoroj, kiujn oni trovas nur en la sodatejoj kaj en la liceoj.

Ankoraŭ unu koridoro kaj ŝi eniris en vastan korton; tie en la centro estas ronda spruĉfontano, kiu de longe ne plu funkcias kaj ne plu renovigas la akvon kovritan per ŝaŭmo verda; en la kvar anguloj bedoj, en kiuj kreskas kelkaj floroj. Ho! kiel malĝojaj ili estas tiuj floroj hospitalaj!

La maljunulino direktiĝis maldekstren al la flanko de la

(1) El la Esperanta konkurso de « Les Annales Politiques et Littéraires ».

(2) Fama Pariza Hospitalo: Hotelo-Dio.



EN MODERNA HOSPITALO,

viroj, kaj ŝi penege komencis supreniri la grandan ŝtuparon. Du viroj malsupreniris kun portilo kovrita per tolo; la malsanulo kuŝanta en tiu portilo ŝajnis multe kaj la du viroj penadis. Sed ĉu la portilo enhavas malsanulon aŭ mortinton? La maljunulino ekretetis kaj supreniris farante la signon de l' kruco.

Ŝi eniris en ĉambregon helan, de kies fundo alvenis murmuro de mallaŭtaj paroladetoj; la suno ludis sur vicoj da blankaj litoj.

Antaŭ la pordo kaj same kiel por bari ĝin, virino sidis en seĝego, apogante la kubutojn sur tablon, ŝi legis kun granda atento felietonon sendube tre interesan; tute vestita per blankaĵoj, ŝi havis sur la kapo malgrandan kufon ornamitan per rubandoj nigraj, signoj de sia rango. La maljunulino rekonis la sinjorinon observistinon kaj timeme ŝi demandis: « Mi dezirus vidi mian filon, Paŭlon Denis. » Ne levante la okulojn de sia gazeto la observistino respondis: « la numero 22, dekstre ».

Sinjorino Denis multkortsita alproksimiĝis la lito de sia filo kaj ŝi kiŝis lin « Ho! mia karulo, mia ido! » — sed ŝi rimarkis, ke li havas la okulojn ja brilantajn kaj la vangostojn ja ruĝajn. — « Vi vidas, panjo, ke mi havas bonan mienon, mi fartas pli bone. » La maljuna virino ridetis malĝoje kaj montris al li la bukedon, kiun ŝi estas alportinta, tiam li ebriiĝis per la parfumo de la floroj, kaj ne lacigante flaradi la dolĉegan bonodoron, li ĉirkaŭprenis la patrino.

Sed Paŭlo volis forigi la malĝojcon de sia patrino, kaj li parolis pri sia vivo en la hospitalo, pri siaj najbaroj, unu el ili, la novulo, havas la tifan febron, kaj tie ankaŭ estas la 14, kiu ĵus havis sangadon. Sinjorino Denis ekrigardis kaj vidis malsanulon terure palan, senmovan; flanke de li staras junulo kun inteligenta mieno, tiu junulo estas vestita per blanka tolaĵo, kaj sur lia antaŭtuko oni vidas freŝan sangan makulon. « La studento hospitala » diris Paŭlo. La junulo estis kliniĝinta al la malsanulo kaj ŝajnis koncentrigi en akra rigardo sian tutan sciencan kaj sian tutan volon kuraci. « Li ĵus enŝprucigis serumon, diris Paŭlo, kaj li atendas. » Post ia mo-

mento oni vidis iom da ruĝaĵo ĉe la vangoj de l' malsanulo kiu moviĝis; la trajtoj de l' studento malstreĉiĝis.

Dum tiu tempo la interparoladoj daŭris apud la lito de ĉiu malsanulo, oni aŭdis eĉ ridadojn.

Sed la vizito estis finita, necese estis pensi pri la foriro; sinjorino Denis diris adiaŭ al sia filo kaj eliris viŝante larmon.

Tiam Paŭlo rigardis sian bukedon; li kisis, li flaris ĝin kun volupto: liaj malfeliĉaj lipoj fendetitaj de la febro, liaj malfeliĉaj lipoj, kiuj ĉiam estas varmaj, refrēŝiĝas kun grandega ĝojo sur la malsekaj florflietoj de l' kreskaĵo. Ho! tio estas bona, tio estas freŝa, tio estas la vivo!

Paŭlo scias, ke li estas tre malsana, ke li tuj mortos, sed li volas vivi almenaŭ tiel longe, kiel lia bukedo; tial li zorgeme verŝas akvon en sian glason, metas en ĝin la floretojn, kaj poste li fermas la okulojn, revante pri la dolĉaj promenadoj, kiujn li iam faris dum la helaj tagoj printempaj, kaj en kiuj oni deŝiris tiel bonodorajn konvalojn en la arbaretoj.

Iom post iom la parencoj, la amikoj forlasis la ĉambregon, kaj nun la malsanuloj lacaj dormetas. La observistino finis la legadon de sia felietono, ŝi malrapide streĉas la brakojn, brue oscedas kaj komencas la inspektadon; ŝi pasas antaŭ ĉiu lito, farante observadon per malĝentila tono; sed oni kutimas, oni ne faras atenton plu.

Ŝi estas nun apud la lito de Paŭlo.

« Aŭskultu do, la 22, oni ne metas florojn en la glasojn, tia estas la regularo! »

Kaj jetinte la bukedon sur la tablon, ŝi forportas la glason. Paŭlo ne protestis, sed larmo fluis de siaj okuloj, larmo kiu enhavis la tutan maldolĉecon de l' homa sufero.

Nun ĉio estas finita, — li relevis la littukon ĝis la mentono, per tiu gesto kutima al la infanoj kaj ankaŭ al la mortantoj. Baldaŭ poste la agonio komenciĝis, kaj en la silento krepuska oni aŭdis lian stertoron, kiun iafoje superis la rauka voĉo de l' observistino en la fundo de l' ĉambrego.

GEORGES CHEVALIER.



ADIAŬ.

Lacega pro homsupera laboro mi ĉesas eldoni « Tra la Mondo ». Kun bedaŭroj, kiujn komprenos tiuj, kiuj sekvas min de la komenco de mia entrepreno, mi forlasas mian infanon tiel karan, pri kiu dum tri kaj duono jaroj mi zorgis kun amo por la plezuro de la legantoj, kaj longe ankaŭ por mia propra kontentiĝo.

Ĉar, laŭ la celo kiun mi donis al mi, estis por mi ĝojo labori, konsciante utili al nia komuna afero per nova procedo. Kaj, ja, la dankemaj leteroj ricevitaj de multaj landoj montris ofte al mi, ke mi ne eraris. Do kun fervoro, sen halto, sen ripozo nek libertempoj, mi klopodis por senĉesa plibonigo de la gazeto; kaj komence mi havis la plezuron senti la aprobon de niaj kunfratoj.

Sed, de preskaŭ du jaroj mi vidis iom post iom ilia intereso iri alien kaj, eĉ ĉe tiuj, kiuj konservas ankoraŭ malpligrandigintan anoncon por « Tra la Mondo », preskaŭ neniam plu oni parolas pri ĝi en la gazetara rubriko.

Estas tre kompreneble, ke, pro la kreskanta nombro de niaj organoj, oni ne povas dediĉi al ĉiu tiom da spaco, kiom antaŭe; sed ne estas deviga fakto, nek akceptebla, ke, en Esperantaj organoj, oni sisteme silentu pri iu atentinda kunfrato en rubriko dediĉita al la kunfratoj, kiam en tiu ĉi rubriko oni havas ĉiam spacon por alia, kaj nun aliaj, kiujn oni penadas altrudi al la spirito de la leganto por ripetataj laŭdoj ofte trograndigitaj kaj ne ĉiam pravigataj.

La maljusteco de l' procedo montras al mi, ke estas senutile batali kontraŭ pripensita kaj intencita kontraŭtenado (1), kaj

daŭrigi laboron, kiu nun kaj ĉiumonate estas por mi maldoĉeca fonto pro tiu maljusteco mem.

Mi, do, forlasas la turnirejon.

Mi ne volis makuli mian esperantistan plumon per vortoj de malamo kiel faris kelkaj Esperantaj gazetoj dum la Ida batalado, kaj kiel iaj min instigis ĝin fari (2); mi ne komencos hodiaŭ per akraj paroloj kontraŭ tiuj, kiuj ĝojos legante tiujn liniojn:

Pli ol ili, mi volas memori la grandan internan ideon de Esperanto, pri kiu tiom parolas kelkaj eminentuloj, kaj kiun ili tiel malmulte aplikas.

Kun kora adiaŭ al la legantoj, mi sendas sinceran dankon al la kunfratoj, kiuj subtenis mian entreprenon ĉu konstante, ĉu komence. La aliajn ankaŭ mi dankas pro la leciono donita: oni povas resti amiko de homoj, nur se ilia intereso ne staras en la afero.

Sed mia plej varma danko iras al miaj kunlaborantoj, dank' al kiuj « Tra la Mondo » restos ankoraŭ longe sen egala pro ĝia varieco, ĝia intereso, ĝia internacieco. Por ili mi havas la rajton ĝin pretendi, kiel multe pro ili mi bedaŭras ĉesi entreprenon al kiu kelkaj estis tiel kore ligitaj, kaj por kiu ili estis ĝis la fino fidelaj helpantoj.

Al tiuj dankoj mi aldonas por ĉiuj, amikoj kaj aliaj, vere sincerajn bondezirojn por la nova Jaro. Ĝi estu bona por Esperanto, la vera, tiu por kiu mi batalas de kvin jaroj, por kiu mi oferis sufiĉe de mia sano kaj de mia mono, kaj perdis iom da miaj iluzioj.

A. MONTROSIER.

(1) Oni ne kredu, ke mi troigas. Iu organo, kiu eĉ ne plu citas « Tra la Mondo » inter la gazetoj ricevitaj, forigis plue ĝian anoncon el sia kovrilo malgraŭ honoraj interkonsentoj, kiuj difinas la amplekson de konstantaj anoncoj reciprokaj, kaj kiuj estas subskribitaj de la reprezentanto de la organo!

(2) Eble ne estas fremda al ilia nuna agmaniero tiu rifuzo kaj ankaŭ la rifuzo forstreki Belga Sonorilo kaj L'Esperantiste el la nomaro de esperantistaj organoj, kiam ili komencis dis-

kuti pri reformoj, restantaj ankoraŭ Esperantanoj. Hodiaŭ mi faris tiun forstrekon nur ĉar ambaŭ organoj sin proklamis definitive Idaj propagandistoj, kaj ke « Tra la Mondo » parolas nur pri esperantemaj organoj. Cetere mi deziras, ke oni ne eraru. Mi konservas al la Direktoro de « Belga Sonorilo » kaj al liaj kunlaborantoj la estimon ŝuldatan al homoj agantaj laŭ sia konscienco. Mia malnova esperantista amiko, Sr^o Bréon, eks-sekretario tiel sindonema de S. f. p. E. permesu, ke mi sendu ankaŭ al li mian tre koran memoron.

A. M.

GRAVA AVIZO.

La intenco de mia direktoro estis definitive ĉesi la eldonon de « Tra la Mondo », kiel rezultas de la ĉi supra Adiaŭ.

Sed kelkaj personoj, opiniante ke la malapero de tiu organo estus vera perdo por Esperanto dezirus ĝin konservi.

Por lasi al ili la eblecon sukcesi kaj por konservi por ili ĉiujn rajtojn pri la titolo « Tra la Mondo », ni ne ĉesas eldoni la gazeton sed nur prokrastas ĝian aperon.

De nun ni petas niajn abonantojn, ke ili bonvolu konigi al ni la uzon kiun ni devus fari el la mono restanta en niaj manoj, se la klopodoj ne sukcesus.

Ni estos dankaj al tiuj, kiuj bonvolos malpligrandigi niajn monperdojn, akceptante la jenajn proponojn:

1^o Personoj ne abonintaj de la komenco de « Tra la Mondo »: ricevus antaŭajn numerojn ĝis valoro de la ankoraŭ ŝuldataj numeroj (3, 6, k. t. p.) kun premio: « Unua Ĉapitro de miaj memorskriboj. »

2^o Personoj abonintaj de la komenco: bonvolus mendi duonjaron aŭ jaran kolekton sendotan donace al amiko aŭ al grupa biblioteko. Sama premio.

3^o La personoj dezirantaj akiri la poŝhorloĝon « L'Espero » povos sendi al ni la diferencon inter ĝia valoro kaj la sumo ŝuldata al ili. Por tiuj personoj ni faros novan specialan rabaton de 1 Sm., t. e. ke la poŝhorloĝo estos liverata je tute favora prezo 11 Sm. (27 fr. 50). Oni aldonu 5 fr. por Rusujo kaj Ameriko.

La personoj, kiuj ĝin deziras, ricevos sian monon poŝtmandate.

Kompreneble ni petas iom da pacienco, kaj insistas por ke ĉiu nepre sciigu sian decidon, skribante tre legeble nomon, adreson, kaj daton de abonkomenco. Tiuj sciigoj estas tre bezonataj ĉar en iuj landoj estas kelkaj samnomaj abonantoj, iajfoje en sama urbo.

Ĉar nia redaktoro, kiu ne ĝuis unu solan ripoztagon de lasta Pasko — kaj kiu deziras mem zorgi pri tiuj aferoj por eviti erarojn — tuj ekvojaĝos dum kelke da tempo, ni petas, ke oni ne atendu respondojn antaŭ la fino de Februaro. « T.L.M. »

DONACO AL ESPERANTISTOJ.

Ni rekomendas al niaj amikoj la malnovajn kolektojn de « Tra la Mondo » kiel la plej agrablan Donaĉon por ĉiuagaj esperantistoj.

Ni estos tre dankaj al tiuj, kiuj helpos nin por la disvendo de tiuj interesaj kolektoj:

Unua Jaro.

Sen la Aprila kaj Maja numeroj. 2,40 Sm.

Dua kaj Tria Jaroj.

Kompletaj, ĉiu 3,40 Sm.

Dua duonjaro de 1908.

Tuj finiĝonta 1,80 Sm.



Plena kolekto.

kostas nur 8 Sm.
anstaŭ 10,4 Sm.

Tre rekomendinda por la bibliotekoj.

300 ARTIKOLOJ ĈIULANDAJ.

500 ILUSTRAJOJ.

Tre rekomendinda ankaŭ

LA POŜHORLOĜO « L'ESPERO »

Vidu la kovrilan anoncon.



EL LA ROMANO: VIKTIMO DE L'EKLEZIO.

Enhavo de la 4^a Jaro: 1^a Duonjaro.

JULIO — DECEMBRO 1908.

Artista aŭ literatura vivado. Ĉiulanda Literaturo.

J. C. SNAPE (Anglujo): Richard Jefferies kun eltiraĵo el « La Hejmo de l' ĉasgardisto »	14
V. ŜULGIN (Rusujo): Malbona Rido	22
LEV. TOLSTOJ kaj MIĤAELO BUVIN (Rusujo): Kredu al vi	36
Fino ŜARAPOV (Rusujo): Lev. Nikolaeviĉ Tolstoj.	40, 72
PRO BUQUET (Francujo): La moralo de Tolstoj	76
SIENKIEWICZ (Polujo): Sur Olimpo, tr. de ZENON KLEMENSIEWICZ (Polujo)	78
MĤAJLOVSKI (Bulgarujo): El Orientaj Legendoj, tr. de G. TRITJAKIN (Bulgarujo)	79

Diversaĵoj.

Kolonelo H. H. HART (Anglujo): Vojaĝo en Kaŝmirujo	3
PRO MARCEL FINOT (Francujo): Balenkaptado	85
PRO MARCEL FINOT: Vintraj sportoj en montaro	81
BILDJOJ: Marbordaj ludoj en Usono	84

Virinaj, fraŭlinaj kaj infanaj pagoj.

VIKTORO RAKCSY kaj R. RAJCSY (Hungarujo): L'organizo de l' Onkloj	26
J. FLOURENS (Francujo): Kuirado	51
J. C. RUST (Anglujo): La perloj	51
KOMANDREO (Francujo): La krimo de Lili	52
G. L. B. (Aŭstralio): La Fraŭlino aŭstralia	61
X. MARMIER, tr. de J. PION (Francujo): La tri fratoj	83

Diversaj Sciencoj. — Sportoj. — Nuntempaĵoj.

PRO MARCEL FINOT (Francujo): Senadena Telefonio	1
JAMES MALLOCH (Skotlando): La skota lingvo kaj Esperanto	2
PRO DURIEUX (Francujo): Kongreso de l'Arto ĉe la Lernejo.	4
PRO MARCEL FINOT (Francujo): Oceanaj esploradoj.	28
» Televidado kaj Telefotografio	32
X. Aerveturado	88



EL ARTIKOLO PRI VOJAĜOJ AL LA POLUSO.



EL ARTIKOLO PRI TOSTOJ

Tra la Mondo. — Ĉiulandaj kutimoj.

L. ^o VAN WEYENBERGH (Flandro): Bruĝo la vivanta.	8
A. BAISSAC (Algerio): Mektub	11
J. FLOURENS (Francujo): La Ramdano	49
J. SCHWARZ (Aŭstrujo): Tra Bosnio kaj Hercegovino	53
ROKSANO (Francujo): Ĉe la Baska Lando	90

Felietono, Noveloj.

C. W. OXFORD, E. V. K. (Anglujo): Marie d'Evray, originala novelo	29, 33
CH. E. RANDALL (Usono): Viktimo de l' Eklezio, originala romano.	65
G. CHEVALIER (Francujo): La regularo.	92

Militistaro kaj Maristaro.

Generalo MARBO (Francujo): La Sieĝo de Zaragoza	5
K ^{no} A. DEN HENGST (Holando): El la vivado de Holanda oficiro en Hindujo.	43

Teatraĵoj.

A. ĈEĤOV kaj R. FRENKEL (Rusujo): Edziĝa propono	12, 19
JOHANINO FLOURENS (Francujo): Liberaeraj Teatroj	17
» Ĉe la Teatro en Orange	47

Miksajoj. — Pri Esperanto.

ROLLET DE L'ISLE (Francujo) kaj R. FRENKEL (Francujo): Internaciaj enketoj	15, 16
P ^{ro} BORD (Francujo): La Kvara	37
STELETO: Bibliografio, kroniko.	16, 48, 63



GLICERINA DENTPASTO



Kiu ĝin uzis, tiu ĝin uzos.

GELLE FRÈRES

Parfumistoj **PARIS**

La firmo korespondas Esperante.



FIOR' ESPERANTA

LIKVORO DE L'INTERLIGO
(FORTIGA KAJ DIGESTIGA)

La analizo pravas la bonajn kvalitojn de tiu-ĉi higiena likvoro
Ĝi meritas de la konsidon kaj la preferon de la Popoloj

TROYES-FRANCE L. GUYOU & J. FÈVRE



CHABLIS QUINA

EL MALNOVA ENLANDA VINO.

Kiel ĉiuj preparoj kun kinkono, la CHABLIS QUINA, deponas maljunigante,
sed tamen ĝi konservas tute siajn eminentajn higienajn proprecojn

LIVERITA LAŬ LA LEĜO. **L. GUYOU & J. FÈVRE**
TIU VINO NE ESTAS MEDIKAMENTO. TROYES



ESPERANTINE

Digestiga likvoro

Alprenita je la Esperantista
Kongreso. Genève 1906

Prezo: FRANCUJE. —
11 f50 la kesto da 2 boteloj
Sen kosto pri transporto kaj
impostoj.

ALLIANDE. — 4f ĉiu botelo
prenita en S^t Etienne,
impostoj kaj transporto pluaj.

Ĝenerala Tenejo por
Francujo kaj Fremdujo:

J. B. Brunon-Chauvet
S^t Etienne (France).

Legu DUONSURDA kaj
UNUA ĈAPITRO.

Internacia Scienca Revuo

Oficiala Monata Organo de la

Internacia Scienca Asocio Esperantista

Administracio kaj Redakcio:

SCIENCA OFICEJO, 8, RUE BOVY-LYSBERG,


Ĝenevo-Svislando.

Specimeno senpage laŭ peto.

Jara abono: 2,75 Sm. (2 spesmiloj 75 spesdekoj).

Unu numero: 25 spesdekoj

Oni abonas ĉe la *Scienca Oficejo*, 8, rue Bovy-Lysberg, Ĝenevo (Svisujo) aŭ ĉe *Möller & Borel*, Berlino (Germanujo), *G. Warnier & Cie* Parizo (Francujo), « *Brita Esperantista Asocio* » Londono (Anglujo), *Raffaello Giusti*, Livorno (Italujo), *M. Arct*, Warszawa (Polujo), *J. Espasa*, Barcelona (Hispanujo), *A. F. Höst & Søn*, Kjöbenhavn (Danujo).



Fervojoj de Paris-Lyon-Méditerranée

VINTRO 1908-1909.

Rapidaj rilatoj inter Paris kaj Hispanujo.

IRO: |

Deiro de Parizo	1 ^a kl.	1 ^a , 2 ^a , 3 ^a kl.	1 ^a kl.
Alveno en Barcelono (1)	9 h. 10 m.	7 h. 27 v.	9 h. 15 v.
	R. V. Paris-Dijon.		7 h. 26 v.
	R. V. Lyon-Avignon.		S. L. Paris-Port-B.

REIRO:

Deiro de Barcelono (1)	1 ^a , 2 ^a , 3 ^a kl.	1 ^a kl.	1 ^a , 2 ^a kl.
Alveno en Parizo	5 h. m.	9 h. 40 m.	6 h. 46 v.
	10 h. 30 m.	7 h. 50 v.	6 h. 10 v.
		S. L. Cerbère	F. L. de Cerbère
		ĝis Parizo.	ĝis Paris

(1) H. E. O.

Luksa vagonaro « Barcelono-Ekspress » (L-V, R.)

tra TARASCON-CETTE.

— Nombro de lokoj limigita. —

Deiro de Parizo	merkrede, sabate	je	7 h. 20 v.
Alveno en Barcelono	ĵaŭde, dimanĉe	je	2 h. 55 v. (H. E.)
Deiro de Barcelono	lunde, vendrede	je	3 h. 30 v. (H. E.)
Alveno en Parizo	marde, sabate	je	10 h. 40 m.

ESPERANTAJ ORGANOJ.

Espero Katolika. — Tute Esperante. Unu No frankiita 0f. 50; Francujo, 4 fr.; alilande 5 fr. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France). (1,60 aŭ 2 Sm.).

Espero Pacifista. — Monata organo de l'Esperantista Societo por la Paco. Jara abono 5 fr. (2 Sm.). Sin turni al S^{ro} Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

La Revuo. — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D^{ro} Zamenhof. — ĉe Hachette k. K., 79 Boulevard St-Germain. Paris. — Jare. Francujo: Fr. 6, ceteraj landoj: Fr. 7. (2,80 Sm.).

Socia internacia Revuo. — Priraktas ĉion, kio interesas la homaran vivadon. Jare 6 fr. (2,40 Sm.). Adm. 45, rue de Saintonge, Paris-3e.

La Verda Standardo. — Scienca kaj literatura. Monate 12 paĝoj. 4 fr. (1,60 Sm.) ĉe S^{ro} Marich Agoston, budapest IX, Ŭhői-ut 59. IV, 8.

Voĉo de kuracistoj. — Monata organo por internacia korespondado de kuracistoj en aferoj profesiaj, etikaj kaj social-medicinaj. Jare 2 fr. 50 (1 Sm.) ĉe D^{ro} Stefan Mikolajski, Lwów, strato Sniadeckich 6, Aŭstrio-Galicio.

ĴUS APERIS

Prozo de Danaj-Norvegaj aŭtoroj

TRADUKITA DE

KL. TH. THOMSEN

Prez. de Klubo Esperantista, Kristiana.

PREZO: 1 FRANKO.

Aĉetebla ĉe ĉiu Esperantista librovendejo.

BIBLIOGRAFIO.

Novaj verkoj: *Jolanto*, la filino de l' reĝo René, laŭ la dana originalo de Henriko Hertz, tradukita de H. J. Runeberg, ĉe Ilarejo Esperantista (1 fr. 25).

Georgo Dandin, de Molière traduko de D^{ro} L. L. Zamenhof, ĉe Hachette kaj K^o (1 fr. 20).

Viva kaj malviva, de M. J. Goldštejn, eliraĵo de nia interesa kunfrato «Internacia Scienca Revuo».

Kiel ni plibeligos la vivon, originalo de Saĝulo, 0,25 sm. *Esperantista Poŝkalendaro* (0,4 Sm.) ĉe Möller & Borel.

Poŝkalendaro por 1909 de J. H. Fred, Edinburgh 25 sd. Aĉetebla ĉe ĉiuj esperantistaj grupoj kaj oficejoj.

Novaj gazetoj: *Franca Esperantisto* (3 fr. — Fremlande 4 fr., 46 Boulevard Magenta, Paris) kaj *Be ga Esperantisto* 4 fr. en Belgujo. — 4 fr. 50 alilande. 20 Vondelstraat. Anvers. Ambaŭ, organoj de Zamenhofaj esperantistoj.

Internacia Pedagogia Revuo, oficiala organo de la Internacia Asocio de Instruistoj (2 fr. 50 ĉe S^{ro} Th. Cejka, Bystrice-Hos yn Moravio)

Al la 3 novaj organoj plej bonajn kordezirojn. STELETO.

PROPAGANDAJ ORGANOJ.

Antaŭen Esperantistoj. — Hispane kaj Esperante. — Organo de la Perua esperantista societo: 3 fr. (1,20 Sm.) Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro. Calle Lártiga, Lima (Peruo).

Rumana Esperantisto. — Oficiala organo de la Rumana esperantista Societo. Tre bela kaj interesa revuo. 5 Sm. Administracio kaj Redakcio: Strada I. C. Bratianu 5, Bucarest.

The British Esperantist. — Jare 4 fr. — Ĉe *British Esperanto Asocio*, Museum Buildings, High Holborn, W.C. London.

Brazila Revuo Esperantista. — Portugale kaj Esperante. 6 fr. (2,40 Sm.) — Ĉela administracio, Rua da Assembleia, 46 Rio de Janeiro.

Ĉasopis Ĉeských Esperantistu. — Monata (krom en aŭgusto kaj septembro). Boheme kaj Esperante. Jare 3 fr. 75. (1,50 Sm.) 3k. por Aŭstrio. Adm. kaj Red.: Praha, Bohemujo.

Esperantisten. — Svede kaj Esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stockolma Klubo. Ĉe P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm. 3 fr. 75 ĉiujare (1,50 Sm.); aparta N^o: 35 cent. (14 Sd.)

Filipina Esperantisto. — Organo de Filipina Esperanto Asocio. Jare 5 fr. (2 Sm.) P. O. Box 326, Manila.

Japana Esperantisto. — Monata, Japane kaj Esperante, kun ilustraĵoj. Jar. 4 fr. (1,60 Sm.) — N^o 1a, 3 ĉome, Jurakĉo, Kozimacik, Tokio.

La Lumo. — 5 fr. (2 Sm.) ĉe Ivan Nenkov, strato sv. gorska, n^o 2299 V. Tirnovo, Bulgarujo.

Pola Esperantisto. — Pole kaj Esperante. — 5 fr. (2 Sm.) Warszawa, Hoza, N^o 40, m. 8.

Suno Hispana. — Hispane kaj Esperante. Abono 3 fr. (1,20 Sm.) Administracio kaj redakcio: Avellanias, 11, presejo — Valencia (España).

Svisa Esper. — France kaj Esperante — 2 fr. (0,80 Sm.). Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

ESPERANTEMJ ORGANOJ.

Les Annales politiques et littéraires. — Jare: 10 f. (4 Sm.). 15, rue St-Georges, Paris. Abono 10 fojojn repagita per la profitoj de l' « Carnet de la mutualité des Annales » (Libreto de l' reciproka apogo de Annales).

De Lusthof. — Ĉiumonata multilustrata revuo. — Ĝi ekzistas de 5 jaroj, kaj estas la plej bela kaj la plej malkara el la landraj ĵurnaloj.

Jara abono: 2 franko; (0,80 Sm.).

Sin turni al la presisto de *Tra la Mondo*, Bruĝo, Belglando.

La plume Sténographique de France. — Universala revuo ilustrata de Stenografio kaj Daktilografio — D^{ro}: L. P. Çanet, Adm., 15, Rue Maigne, Limoges. — Ĉiulandaj sciigoj pri ĉio rilatanta la rapidan skribadon kaj la skribmaŝinojn; ĉiusistema stenografio, literatura kaj historia fako, ilustraĵoj, ludoj, k. t. p. Petu specimenon.

ILUSTRITAJ ESPERANTISTAJ POŝTKARTOJ.

Nova serio de Dek malsamaj vidaĵoj de la famaj fabrikoj Schneider kaj de la urbo « LE CREUSOT ».

Ĉiu Serio (dek kartoj) kostas 0,4 Sm.

SENDI LA MENDOJN AL:

Esperanto-Oficejo
« Le Creusot » France.

DUONSURDA.

Originala duakta komedio de

JOHANINO FLOURENS,

30 c. — 12 Sd, ĉe « Tra la Mondo ».

REKOMENDATAJ FIRMOJ.

ĈEBANKO ESPERANTISTA.

Ni rekomendas al niaj legantoj tiun ĉi kreaĵon, fonditan de nia agema samid Ĉefeĉe.

Ĝi faros grandajn servojn al ĉiuj persoj kiuj havas interŝanĝojn monajn kun fremduloj.

Bedaŭe ni ne povis pli frue ĝin signifi niaj kolonoj. Nura adreso.

ĈEBANKO ESPERANTISTA.

Merton Abbey, London, S. W.

SVEDUJO. Profitigaj mondeponoj kontraŭ la gradaj garantiaĵoj estas perataj HJALMAR BÄCKSTRÖM, Stockholm C. Telegrafadreso « Esperanto ».

S^o G. Douglas Buchanan. — Pardonu se mi skribis al v.; mi estis tro okupata. Dankon via fideleco. A.

LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTO

eliranta la 15-an de ĉiu monato

48 paĝoj (13 × 20 cm.), nur en Esperanto

LITERATURA ALDONO: 16 paĝoj.

JARA ABONO: 7 fr. 50 (3 sm.)

ADMINISTRACIO:

Preso Esperantista Societo,

33, Rue Lacépède, Paris

Specimena numero estas senpage ricevebla

Juna Esperantisto

MONATA GAZETO

por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-lernantoj

Jara abono: 2 fr. 50 (1 Sm.).

Administracio: Preso Esperantista Societo

33, Rue Lacépède, Paris.

Specimena numero estas senpage ricevebla.

Fandejo por presiloj DEBERNY kaj K^o

58, Rue d'Hauteville — PARIS

Kompleta instalo de presejoj. Granda elekto pri skribliteroj, tekstoj kaj ĉiuspecaj fantazioj. Presliteroj kun supersignoj speciala por ĉiuj fremdaj lingvoj kaj ESPERANTO. La fandejo DEBERNY kaj K^o sendos, laŭ peto, presprovajojn el ĉiuj siaj serioj en kiuj ĝi posedas la specialajn supersignojn por ESPERANTO.

EUGÈNE MONTRONSIER, Gérant.
A. J. WITTERYCK, Presisto, Bruĝo.